



SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : 5 F.

C. C. P. 956-28 Montpellier

1-a Kvaronjaro 1976

N° 58

BEZIERS

FEDERACIA KONGRESO 1976

Kiel anoncote en la lasta numero de "Sudfrancia Stelo" nia ĉijara federacia kongreso okazos en Béziers dimanĉon la 14-a de marto.

La kongresejo estos la sama kiel la antaŭdujara, tio estas la "Komerca Ĉambro" situanta sur la famaj Aleoj Paul Riquet.

Ĉar nur ĝis la tagmezo ni povos uzi la salonegon, hepre necesas ke la laborkunside komenciĝu je la 9-a. Tamen se la diskutoj ne estos finitaj tagmeze eblos ilin daŭrigi ĉe la restoracio.

Post la tagmanĝo kaj la finaj diskutoj, se la vetero estos bela, ni povos promeni borde de la rivero laŭlonge de la "parcours Vita" se oni sentas sin sportema aŭ tute simple, resti en la apuda ĝardeno. La "parcours Vita" troviĝas je proksimume 5 km. de la urbo sur duoninsulo borde de la rivero.

La elektita restoracio estas la "Excelsior", vid-al-vide la stacidomoⁿ. Ĝi ne estas tre malproksima de la "Komerca Ĉambro" piedirante tra la "Ĝardeno de la Poetoj". Oni povas ankaŭ atingi ĝin, aŭtomobile, per alia vojo.

La menuo de la komuna tagmanĝo konsistas el: antaŭmanĝaĵo, bovaĵo aŭ porkaĵo kun legomoj (versajne terpomoj), salato kaj deserto. La prezo estas fiksita je 22,00 F.

Se vi deziras partopreni la komunan tagmanĝon vi bonvolu senprokraste averti S-inon AUTHIER (9, rue G. Picot - 34500 Béziers) aldomante la necesan antaŭpagon per ĉeko je la nomo de la "Fédération Espéranto de l'Hérault" (C.C.P. Montpellier 1689-89)

Krom la kutimaj punktoj de la tagordo (financa situacio, bulteno, preparo de la nacia kongreso en la Grande Motte k.a.), ĉijare ni devas voĉdoni pri la federacia komitato laŭstatute renovigebla ĉiutrigare. Kandidatoj bonvolu sin anonci antaŭ la kongreso. Ĉiuj federacianoj rajtos voĉdoni.

En la januara numero de "Revue Française d'Espéranto" enestos la jarraportoj de U.F.E. kaj la aktivaj membroj de U.F.E. por la jaro 1975 devos voĉdoni - nur ili rajtos tion fari - pri la agado de nia nacia asocio dum la pasinta jaro kaj elekto de konsilianoj de U.F.E. La kompleta listo de la voĉdonontoj troviĝas fine de tiu ĉi cirkulero.

Finskribinte tiun ĉi cirkuleron mi ankoraŭ ne ricevis R.F.E. sed mi supozas, ke krom la jarraportoj tre certe ankaŭ enestos la necesaj informoj por voĉdoni. Do ĉiu voĉdononto povos prepari sian voĉdonilon por ke, kiel kutime, dum la kongreso ni ne perdu tempon.

La aktivaj membroj kiuj kongr^esos en Béziers bonvolu kunporti sian jam pretan voĉdonilon, kaj tiuj kiuj ne povos kongresi bonvolu transdoni sian jam pretan voĉdonilon al iu ĉeestonto.

Mi esperas, ke en Béziers ni estos multnombraj. Dume kaj resume necesas ke:

- ĉiu partoprenonto rezervu sian sidlokon por la komuna tagmanĝo samtempe sendante la necesan monon al S-ino AUTHIER.
- la kandidatoj por la federacia komitato sin anoncu.
- la voĉdonontoj pri la agado de U.F.E. en 1975 preparu sian voĉdonilon por ĝin kunporti aŭ transdoni al ĉeestonto.
- sugestoj kaj demandoj por enskribigi en la tagordo alvenu sufiĉe frue.
- Ĝis revido en Béziers la 14-an de marto.

Jean AMOUROUX
federacia sekretario.

LISTO de la federacianoj, aktivaj membroj de U.F.E. en 1975 (voĉdonontoj):

ALES: Ges-roj NOUIER, POLGE, RAYNAUD, VILLEMIN.

BEZIERS: S-inoj AUTHIER, ROUVEURE, TERRAL.

MONTPELLIER: Association des Routiers Pellerins, Ges-roj BETTAN, CABANEL, CAPUS A.,
CAPUS S., COURSINDEL, DIEZ, LENHARDT, MOURGUES, VIERNE.

NARBONNE: S-roj DELIGNE, GRANIER.

NIMES: Ges-roj AVESQUE, BOUET, CACHON, COMBE, GERLIER, ROLLE, SALAN, VOLPELIERE
Renée, VOLPELIERE Roger.

PERPIGNAN: - "Centre Culturel Espérantiste": S-roj BENAZET, LLECH-WALTER.

- "USCM-ESPERANTO": S-ro AMOUROUX.

FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO

FEDERACIO LANGVEDOKO-RUSILJONO

1975 (aldona listo)

sukcesis en:

ATESTO PRI LERNADO: - S-ro VIALLA G. - Cito "tre bone" - (USCM-ESPERANTO PERPIGNAN)
- S-ino VIALLA - Cito "sufiĉe bone" - same -
- F-ino AMOUROUX Véronique - same -
- F-ino GENTILI Isabelle - same -

ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO:

- S-ino GRACIA L. - Cito "bone" - same -

Maria Frus
Geoffrey King



Anoncas kun ĝojo sian geedzigon, kiun oni celebros (en Esperanto, fare de Pastro A. Ceccanti) en la preĝejo de S.S. Stimate di S. Francesco d'Assisi, en Torino (Italio) je sabato 20-a de marto 1976, je la 16-a horo.

Via G. Ascoli, 1 - 10144 Torino (ITALIA)

12, Elmer Close - Enfield Middx. EN2 7EZ (INGHILTERRA)

Recenzo — Doktoro Georges SALAN — **La Nuda Vero**

Broŝurita; Glaciumitaj kovrilpaĝoj kun kolorfoto de la drelika koncentreja jako, biografieto kaj foto de la aŭtoro. 188 paĝoj. Novembro 1975. Aĉetebla ĉe la aŭtoro: 19, rue Pradier -30000 - NIMES. Prezo: 30,00 F.F. (35,00 F.F. afrankite). Aldoni la pagon al la mendo.

Aŭtentika patrioto, militrezistanto dum la dua mondmilito, deportita en Germanio, Doktoro SALAN aperigis en 1946 libron en la franca lingvo en kiu li fidele raportas pri la terura sorto de la deportitoj sub la nazia subpremado. La dua kaj tuja eldono ankaŭ tre rapide elĉerpigis.

En novembro 1975, en la kadro de la 30-a jardatreveno de la liberigo de la naziaj koncentrejoj la aŭtoro, proprainiciate kaj proprakoste, eldonis Esperanto-adapton de la koncerna libro.

J am la titolo, "La Nuda Vero" - aŭ alidirite "apenaŭ kredeble sed vere" - incitas la scivolemon de la legonto.


Ĉi volumo apartenas al la kategorio de la libroj kiujn, la unuan fojon, oni legas avide kaj unuspire. Tion mi faris sed de post mi ĝin relegis pli trankvile kaj certe plurfoje ĝin relegos ĉiam ĉerpante ion novan, kelkfoje ne klare difinita aŭ esprimebla, en la riĉa substanco de la verko. Tute ne temas pri romano kies enhavon oni forgesas kiam oni estas ĝin finleginta. Ankaŭ ne estas rakonto kun ĝia kvanto da troigoj. La ĉefa rolanto estas la aŭtoro mem kiu volis ne rakonti sed tute simple fidele raportiti kaj atesti. La faktojn li mem ne juĝas aŭ komentis. Li nur liveras la "Nudan Veron" al la juĝo de la leganto.

La stilo estas senpretenda, simpla kaj kelkfoje iom sekeca kio donas al la teksto pli da profundeco sed la fakto ke la Akademiano Roger BERNARD trarigardis la manuskripton estas garantio de pura lingvaĵo.

Ĉiu el ni certe jam legis kaj vidis multon pri la nazia subpremado sed, ĝis nun, simila aŭtentika kaj unuaranga atesto mankis en Esperanto.

Doktoro SALAN kuraĝis honeste raportiti pri teruraj travivaĵoj kaj, dediĉante la libron al du deportitaj esperantistoj, amikoj liaj, kiuj, pli malbonŝancaj ol li, ne revenis el la nazia infero, li omaĝas la martirojn kaj, dankinde, ligas Esperanton al la 30-a jardatreveno de la liberigo de la naziaj koncentrejoj por ke, spite ĉies ŝtormo da sentoj, la esperantistoj, ne nur eŭropaj sed tutmondaj, ne plu ignoru, meditu kaj ne forgesu.

Jean AMOUROUX.





Deziras korespondi

Grupo de 30 membroj inter 20 - 45 jaroj - arkitektoj - apotekistinoj - sekretariinoj - inĝenieroj - studentoj - filatelistoj - serĉas interŝanĝon de belaj poŝtkartoj kun eksterordinaraj poŝtmarkoj kaj poste de leteroj.

Skribu al la kursgvidanto SCHULZ Rikardo - Otto Eriek Str 5 1502
BABELSBERG 2 - Rép. Dem. Allemande, kiu transdonos.

ESPERANTO EN TELEFONLIBROJ

En la telefonlibro de la departemento Pyrénées Orientales (Orientaj Pireneoj) eldono 1976 - estas sub la rubriko ESPERANTO la adreso kaj la telefonnumero de la Franca Esperanto-Federacio Langvedoko-Rusiljono, 72, Avenue Général de Gaulle, Perpignan.

Imitinda ekzemplo.

VORTOJ DE LA PREZIDANTO

Unue al ĉiuj membroj de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono" mi sendas miajn plej koraĝn bondezirojn por la Novjaro!

En Perpignan okazis la 13-an de decembro en la nova kvartalo "Moulin à Vent" kaj la 17-an de decembro en la Federacia sidejo, kunvenoj omaĝe al D-ro ZAMENHOF.

Nun funkcias 3 kursoj semajne en Perpignan, 2 ĉe USCM-Esperanto (Moulin à Vent), eĉ jam okazis ekzamenoj kaj 1 ĉe la federacia sidejo.

En Elne, apud Perpignan, post miaj 3 prelegoj, Sro CANONNE, Prezidinto de la grupo de Valenciennes, gvidas du kursojn, unu por la gelernantoj de la kolegio Paul Langevin kaj la alia por la plenkreskuloj.

Ĉiusemajne aperas artikoloj por anonci la kursojn kaj ankaŭ la gazetaro afable represas la artikolojn de "Esperanto-Information UFE". Bona propagando kaj senpage!

La konstanta ekspozicio ĉe la montrofenestro de la Federacia sidejo ĉiam loĝas la rigardojn de la preterpasantoj kaj kelkaj petas informojn.

J.E.F.O. nia junularo, nia estonto, deziras ekspozicii ĉe "Espo-Jeunes" sed mankas mono, ĝi alvokas la esperantistaron por donacetoj; la grupoj estas petataj partopreni (se eble 25 F.), individue oni povas ankaŭ helpi: JEFO, C.C.P.3170994Y La Source. Sed vi povas sendi la monon al nia kasisto Sro DELIGNE kiu kolektos.

Ne forgesu, ke JEFO estas nia estonta U.F.E. kaj ni devas helpi ĝin.

La Federacio ne estas tro riĉa sed tamen ĝi donacos 30 F.


Ne forgesu kolekti la kotizojn por UFE/UEA kaj Sudfranca Stelo kaj sendu al nia kasisto. Dankon.

Tutkore, La Prezidanto, René LLECH-WALTER.

K R U C V O R T O J

Horizontale *

- 1- Tio, ke oni ne povas ĝin montri, rilate senton aŭ person.
- 2- Ŝtupetaro - saltanta insekto (R)
- 3- Rekte: prefikso, inverse: subjunkcio
Granda lago (R) - Grava organizo
- 4- Malrapida hispana danco - konjunktio.
- 5- Tion oni povas fari pro timo aŭ malvarmo.
Instrumento por disfibriĝi kanabajn tigojn.
- 6- Nedefinita pronomo - Verba finaĵo - Aro de antikva popolo kiu loĝis en okcidenta Eŭropo antaŭ la invado de la Keltoj (R)
- 7- Papa cirkulero (R)
- 8- Zorgi, ke iu ne difektiĝu - Nomo de litero-vitina homo.
- 9- Distanco inter la celitaj kaj la trafita punktoj (R) - Plezurdona ĝardeno (R)
- 10- Manĝebla radikoj - Rigardi ion kies gravan (R)
- 11- Tri literoj de "Lanugo" - Internacia prefikso signifanta: opozicie al Nomo de litero
- 12- Dolĉaj fruktoj -



E. King (1976)

Vertikale *

- 1- kies bruladon oni ne povas ĉesigi.
- 2- Hortiginta parto de haŭto - Seka frukto de helianto (R)
- 3- Prefikso - Prefikso - Erartabelo en la fino de La Libro (R)
- 4- Vosthava amfibio
- 5- Decido de loĝantaro per voĉdono (R) - Membro (R)
- 6- Rilata al Eŭropa ĉefurbo - Arkforma akvomaso (R)
- 7- Tromalnova - Inverse: partcipa sufikso
- 8- Osto de la malsupra makzelo de la vertebruloj - Unujara herbo (R)
- 9- Prefikso - Lubriki - Sufikso
- 10- Miksado de senharmoniaj sonoj (R) - Iu aĵu planto el tre granda familio al kiu apartenas la vanilo (R)
- 11- Planto utiligata por la teksindustrio - Elstara osteto.
- 12- Junuloj inter 15 kaj 25 jaroj -

* - (R) Nur radikoj

Solvo
de la krucvortoj
aperinta sur la NSP

P	E	R	P	I	G	N	A	V				
U		S	A	H	E		G	A				
	A		R	A	M	P	A	N				
S	T	R	I	G		L		T				
K	L	A	S		A	E	R	E				
A		S		A	M	B	O	S				
R	I	P	E	T								
A	R		K	A	Z	O						
B	U	K	U	R	E	S	T	I				

Geoffrey King


5 minutoj da intervalo




Nun mi ne plu dubas, estas vere « MORTA NATURO ».




Laŭ mi tio ne pritraktas florojn.



Kie vi havas kapon? Teren...



SEN VORTOJ



SEN VORTOJ



R. Fruzs

FRANCA KONGRESO en la GRANDE-MOTTE

Pasko alproksimiĝas kaj ne multaj federacianoj aliĝis la kongreson. Domage ĉar estas bona kazo partopreni francan kongreson.

1 - Ĝi okazos en nia regiono, do proksime, en plaĉa urbeto.

2 - La organizo estas aparte alloga: ĉiuj partoj de la kongreso okazos en la sama domo kiuj estas feriejo kun ĝardenoj "Logis familiaux Les Cyclades". Tie ni manĝos, tranoktos, kongresos, babilos K.t.p.. La domo estas bela, agrabla; komforta. La prezo ankaŭ estas alloga: 48 F. po persono por 1 taga loĝado + 3 manĝoj en 1 persona ĉambro. La paroj ricevos "studic-n" kun aparta tualetĉambro kun duŝo kaj necesejo.

3 - Dimanĉe vespere, okazos BANKEDO: 25 F. por la personoj kiuj loĝos en "Logis Familiaux" kaj 40 F. por la personoj kiuj loĝos aliloke.

4 - Duontaga ekskurso, lunde posttagmezo: La Grande Motte - Carnon - Palavas - Maguelone - Centro de Montpellier (piede) - 15 F.

Taga ekskurso: mardo: La Grande Motte - Montpellier - La Clamouse (vizito de grotoj) - St Guilhem le Désert (vizito), Nourze (tagmanĝo kaj vizito) - Lago de Salagon - Cabrières (vizito al kooperativa vinrikolto) - Montpellier - La Grande Motte - 60 F. (kun la tagmanĝo).

5 - Kiel atingi La Grande Motte: trajne, apud la stacidomo de Montpellier vob trovos haltejon de aŭtobusoj kiuj regule disservas: La Grande Motte - Le Grau du Roi. La haltejo "Logis Familiaux" staras antaŭ la Kongresejo.

6 - Aliĝu baldaŭ kaj mendu dormaĉambron al "Logis familiaux" antaŭ ke ĝi estos plenplena (alie restos le hoteloj). Ĝis la 1^a de februaro aliĝis 115 personoj. la kongreso anoncas sin sukcesa, kaj oni povas resti pli longtempe post la kongreso.

GEEZDIĜO

Nia amiko Jean-Pierre LAURENTI, esperantisto, filo kaj nepo de esperantistoj, edziĝis dum la somero al juna simpatia esperantistino el Pollando Elzbieta DOBRUCHOWSKI. La ceremonio okazis en Tokun (famkonata urbo de Nikolao KOPERNIK). Nun la paro loĝas en Montpellier. Ni gratulas kaj deziras plejanfeliĉon kaj prosperon al ili.

REGA FESTO

Malfrue la loka grupo festis la "Reĝojn" la 2an de februaro, malgraŭ la frosto, malsanoj kaj striko de aŭtobusoj, 40 gajaj personoj kunvenis. Oni manĝis, trankis, kantis, ludis, babilis, spektis "Klarigandan leteron" de BUKAR. Ni esperas, ke la 10 novaj gelernantoj revenos. Kial ne? Ili aspektas tre kontentaj.



Ekspozicio en NIMES

8 - 15 de februaro

Plensukcesa fariĝis nia ekspozicio bone lokita en la granda salono "Galerie Jules Salles", kiu situas sur la bulvardo la plej laŭirita de la urbo.

Ni agnosku, ke tiu ideo: fari tie ekspozicion estas tiu de nia kompatinda kamarado Gilbert PUECHAGUT, kiu propramove rezervis la salonon. Ni ne aŭdacus tion fari timante la vastecon de la ĉambrego. En ĉi tiuj cirkonstancoj la vontoj de Danton estus bona konsilo.

Ni intencis prezenti la ekspozicion de S.A.T. ricevitan de G. PUECHAGUT kaj tiun organizitan de Leo LENTAIGNE. Bedaŭrinde nia amiko PUECHAGUT ne venis la unuan tagon aranĝi la S.A.T.-ekspozicion kaj fine de la mateno ni eksciis de lia fratino, ke li estis, antaŭ du tagoj, trafita de koratako kaj transportita en malsanulejon en la plej malbona sansatato. Tre kortuŝitaj de la malfeliĉo, kiu atingis nian kamaradon, ni ne forgesos, ke al li ni ŝuldas la akiritan sukceson.

Fakte, kvankam kelkaj el la invititaj personoj ne venis je la 17a horo dimanĉon por la inaŭguro, sed petis senkulpigon, ni kalkulis 250 vizitantojn en la posttagmezo (ĉiu eniranto estis notita).

Radio-Nimes tuj petis de ni du intervjuojn, unu por la Garda departemento kaj unu por la tuta regiono Langvedoko-Rusiljono. Krom la anoncoj de ni alportitaj al tiuj gazetoj, aperis en Midi-Libre kaj La Marseillaise unu artikolo kun foto kaj fine la televidofico sendis oficiston kaj la elsendo okazis la vendredon 13an kaj estis tre ŝatata. La spontanea reago de la gazetistoj, poste de la radio- kaj televid-oficoj montras la intereson instigitan de nia agado.

Ni disdonis 300 flugfoliojn kaj donis klarigojn al multaj personoj, el kiuj kelkaj tre deziras lerni nian lingvon kaj ni ricevis gratulojn pro la prezentado de tiu ekspozicio destinita al konigo de internacia lingvo, kies nepra bezono estas nun de ĉiuj memvidebla, kaj pro la valoro de la prezentitaj libroj.

La tri kofroj de nia Federacia Garda Grupo estis bonvenitaj por parte anstataŭi la S.A.T.-ekspozicion kaj la por tiu preparitajn tablojn oni kovris de multaj dokumentoj, turismaj prospektoj, gazetoj kaj revuoj.

Ni profitis la okazon de la multaj vizitantoj por peti subskribon de la peticio subtenonta la leĝproponon pri enkonduko de Esperanto en la liceoj, kaj ricevis 190 subskribojn.

Ni diru nun nian kontenton pri la bona teamspirito, kiu montriĝis por la gardo de la ekspozicio kaj kompreneble pro la nombro de personoj nun informitaj: fine ni kalkulis 1215 vizitantojn.

Certe pluraj miris, vidante la diversecon de la libroj kaj revuoj kaj ni ne dubas, ke ilia sinteno vidalvide esperanton estos nun ŝanĝita.

La belega rezulto pagis la penon de ĉiuj, kiuj kontribuis al tiu manifestado.



Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 1^{er} Trimestre 1976

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes

68-a nacia kongreso: LA GRANDE MOTTE 16 - 21 aprilo 1976

LOG- MENDILO

Ĉiu partoprenanto devas plenigi apartan mendilon kaj sendi ĝin al:

S-ino NEGRON, 22 chemin du Mas Blanc - 34400 - LUNEL

FAMILIA NOMO: S-ro S-ino F-ino
persona nomo
kompleta adreso
Mi deziras logi kun S-ro S-ino F-ino

I - Bonvolu rezervi: a) en LES CYCLADES (Logis Familiaux) (loĝado, maten-tag-vesper-
mangoj) 1 persono 48 F. tage
b) en hotelo (nur ĉambro) kun duŝo 1 persono 71F 2 personoj 78F por unu nokto
kun bano 1 persono 92F 2 personoj 99F por unu nokto

II - Mi alvenos la an de aprilo je la horo
Miforiros la an de aprilo je la horo

III - Mi ne loĝos en LES CYCLADES sed tamen mendas mangojn (15F) en ĝia restoracio.
sabate tagmeze (...)
vendrede vespere (...) sabate vespere (...)
dimanĉe tagmeze (...) lunde tagmeze (...)
dimanĉe vespere (...) lunde vespere (...)
marde vespere (...)

IV - Tiu mendilo valoras nur kun la sendo al C.C.P.

GEM 68-a nacia kongreso de Esperanto - MONTPELLIER 2142.19 T

a) unutaga gastoprezado de la elektita kategorio por ĉiuj partoprenantoj sumoF
b) perada maklerado por la loĝiga servo 10 F

- En LES CYCLADES, la klientoj devos kunporti siajn tualettukojn kaj mastrumi sian ĉambron

Oni povos restadi pli longe ol la kongresdaŭro (AVERTI)

- Tendumejo: multaj eblecoj, rezervado ne necesa.

Plie mi mendas: bankedon kaj mi pagas 25 aŭ 40F F
duontagan ekskurson 15FF
tuttagan ekskurson 60F F

SUMO :